

Novembro-decembro 1955, Nroj 3-4.

LA JUNA VIVO

MONATA BAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435²

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Abonprezo 3.50 ned. guld. aŭ egalvaloro

Karaj Geamikoj!

Ĝoje mi ricevis la sciigon en LJV ke la junularkunveno elektis preskaŭ novan, vastan kondukantaron en diversaj landoj. Mi esperas, ke vi komprenu la gravan signifon de via tasko. Forte laboru kaj ne hontu sendi al la kongreso raporton pri viaj faroj kaj travivaĵoj, eĉ se vi faris preskaŭ nemon.

Nur tiam vi komprenos la spiriton de Dr Zamenhof.

Ne per elturnaĵoj nia movado povas kreski, nur per veramaj pensoj kreskas la interna ideo pri kiu Dr Zamenhof parolis.

En via kunveno vi pritraktis ankaŭ la kontroladon.

Kial mi deziras la plej ekstreman kontrolon?

Vi jam aŭdis en la kongreso, ke la financaj aferoj pro tro malmulte da kontrolo estas en malbona stato. Kontrolo estas necesa ne nur por financaj aferoj, sed ankaŭ por spiritaj aferoj tiom longe, ĝis kiam ni ne estas liberaj homoj. (Liberaj homoj estas homoj, kiuj ne plu vivas profite al aliaj homoj). Neniu el ni estas tute libera homo kaj pro tio ni mem devas postuli

kontrolon. Tiu kontrolo estas en la intereso de nia movado.

Ni havas la devon varbi multe da novaj anoj. Laŭ mi tio nur eblas, kiam ni komencas propagandi la internan ideon de Dro Zamenhof. Tio estas la ideo ke ĉio kaj ĉio en la mondo ne povas ne kreski el la interna vivo.

Preskaŭ ĉiuj konfliktoj laŭ Dro Zamenhof estas kaŭzataj pro manko de sinkonado. Laŭ Jezuo Kristo ĉiuj konfliktoj estas kaŭzataj pro manko de sinkonado. Pensu pri la vortoj: „Patro pardonu ilin, ĉar ili ne scias, kion ili faras.“

La celo de la verko de Dro Zamenhof estas instrui unu la alian kompreni la internan vivon, por ke la kompreno inter la homoj kresku kaj paco regu en la mondo.

En LJV ni nepre bezonas rubrikon por komprenigi al la junularo la plenan verkon de Dro Zamenhof.

Bonvolu bone pripensi la enhavon de mia artikoleto kaj sendu kiom eble plej baldaŭ respondon al mia adreso.

S-ino E. van Veenendaal-Bouwes,
hon.prez. de TEJO
Linnmen (N.H.) Nederlando.

MI ESTIS EN VARSOVIO.

Mi ne estis kun vi, karaj geamikoj, en l'Aquila. Tion mi ja bedaŭras kaj bedaŭras des pli, ke de pluraj jaroj mi promesas: „venontan jaron mi ĉeestot”, kaj ĉiujare iu kaŭzo malhelpas min. Sed la ĉi-jara kaŭzo estis ja eksterordinara: mi estis en Varsovio.

Varsovio-Warszawa! La ĉefurbo de Pollando, antaŭ dek jaroj amaso da ruinoj, hodiaŭ urbo kun unu miliono da enloĝantoj, akceptis dum du semajnoj (31.7-14.8) la 5-an Tutmondan Festivalon de Junularo kaj Studentoj por Paco kaj Amikeco. Partoprenis 30.000 gejunuloj el centoj da landoj.

Rakonti la Festivalon ne estas eble; volumojn oni bezonus. Cetero tion mi ne intencas ĉi-tie, ĉar certe vi ĉiuj legis en viaj nacilingvaj gazetoj, aŭdis per la radio pri la Festivalo.

Dum du semajnoj seninterrompe sekvis unu la alian la plej diversaj manifestacioj. Mi provos ilin klasifiki kaj respektive juĝi:

-konkursoj sportaj kaj kulturaj (muziko, danco k.s.): ĉi-tiuj, per la nombro kaj nivelo de la partoprenintoj havis nedubinde universalan gravecon.

-diversaj amasmanifestacioj, kiaj la Malferma Parado, la Renkontiĝo kontraŭ la amasdetruaj armiloj, la Parado de la Pola Junularo k.a. Tiujn oni devas juĝi kiel manifestaciojn en kiuj la partoprenintoj kolektiĝis por proklami komunajn ideojn.

Al tiu parto oni devas aldoni la distrajn aranĝojn: baloj, Karnavalo ktp.

-renkontoj inter delegitaroj: tiuj, kun sufiĉe malgrava nombro de partoprenantoj, povas esti interesaj, kiam oni sukcesas trovi kaj konservi en angulo kelkajn homojn kun kiuj oni povas paroli komunan lingvon. Bedaŭrinde tiu komuna lingvo plej ofte

mankas, kaj la kunveno prenas la aspekton de malgranda facila manifestacio, kun paroladoj, kantoj kaj glaslevoĵoj.

-fakaj renkontoj kaj „seminarioj”: ilia nombro estis grava: la diversfakaj studentoj kaj laboristoj renkontiĝis por pritrakti siajn profesiajn problemojn. Tiuj renkontiĝoj estas — aŭ devus esti — la plej interesa parto de la Festivalo pro sia serioza kaj kleriga karaktero. Tamen ni devas sincere kaj sen malbona intenco konfesi, ke ĉio estas fuŝata pro la uzo de diversaj lingvoj, kaj la necesa traduk-sistemo, kio ne nur perdigas tempon, sed ankaŭ malebligas la diskutojn. Mi mem ĉeestis la „seminariojn” pri literaturo kaj pri pedagogio. Tio meritas apartan raporton, kiun mi verkos por venonta numero.

-fine; la personaj kontaktoj: ili certe estas la plej interesaj kaj plej instruigaj. Ne ĉiun tagon okazas, ke Okcidentano vizitas popoldemokratian landon, kaj estas memkompreneble, ke mi havis multajn konversaciojn kun Poloj pri la vivkondiĉoj kaj problemoj de nuntempa Pollando.

Certe tiu seka kaj iom kritikema raporto tute ne priskribas la atmosferon de la Festivalo. Tion oni devas travivi, tio estas kvazaŭ nerakontebla. La tuta ĉefurbo ornamita per flagoj kaj afiŝoj, superŝutita per muziko, plenigata de la kantoj kaj ridoj de tridek-mil eksterlandaj junaj gastoj ...

Kion interŝanĝi, kiam oni ne parolas komunan lingvon? Oni interŝanĝas insignojn, aŭtografojn, ridetojn, kisojn. Estas psikologie komprenebla fakto, ke ju pli oni ne povas interkompreniĝi, des pli oni obligas la amikecajn signojn. Tio estas ja ege simpatia kaj

liveras al ĵurnalistoj la okazon por verki lirikajn priskribojn kiel: „tiuj junuloj, kiuj parolas tiom multe da lingvoj trovis komunan lingvon: gestoj taŭgas por esprimi ilian amikecon, ilian ĝojon. Kaj la muziko, kia internacia lingvo ...”

Kompreneble estas facile por ni, esperantistoj, ironii pri tiel naivaj ideoj aŭ indigni ĉar tiel oni malaltigas nin, konsciajn gejunulojn, ĝis la rango de tiuj diplomatoj kaj ministroj, kiuj amikece gestas unu al la alia por kaŝi siajn malakordojn. Sed ironio aŭ indigno el nia flanko tute ne efikos, se ni ne agas celkonscie kaj tre pacience por ŝanĝi iom post iom tiun situacion.

Estas nepre ĝojiga kaj kuraĝiga fakto, ke dum la 5-a Festivalo okazis por la unua fojo oficiala renkonto de esperantistoj. Tion ni ŝuldas al la klopodoj de la Asocio de Esperantistoj en Pollando kaj al la komprenemo de la Prepar-Komitato de la Festivalo.

La 6-an de aŭgusto matene, salono de la Domo de ĵurnalistoj estis plennigata de preskaŭ 150 esperantistoj, inter kiuj proksimume tridek eksterlandanoj el 14 landoj. Ĉeestas ankaŭ ĵurnalisto kaj reprezentanto de Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo. Prezidas Englund Bertil (Svedo) kun Ronald Lynn (Brito) kaj Tadeusz Michalski (Polo) kiel asesoroj. Post alparolo de la Prezidanto, oni legas salutleterojn kaj telegramojn. Mi legas salutmesaĝon de la Prezidanto de T.E.J.O. kaj ankaŭ salutas nome de la Franca Sekcio. Aliaj salutleteroj venas el diversaj asocioj kaj landoj, eĉ de esperantistaj studentoj en Moskvo.

Poste, Michalski legas raporton pri la utilo de Esperanto en la porpaca laboro. Tiu raporto estas poste diskutata per intervenoj de ĉeestantoj el diversaj landoj. Oni pritraktas la pro-

blemon de la uzado de la internacia lingvo en la venontaj Festivaloj, oni — ankoraŭ-foje! — aludas la tiklan temon de la „interna ideo” ...

La dua parto de la kunveno estas dediĉata al arto: polaj artistoj kantas kaj deklamas en Esperanto. Ni ĝuas la aŭdon de bulgara popola muzikilo ... La kunveno finiĝas per la „Marŝo de la Junularo”. La partoprenintoj sin direktas al la bufedo, kie ili povas libere interparoli, kaj kie juna ĉarma Polino disdonas ekzemplerojn de „La Juna Vivo”.

Du ĉehaj aŭtobusoj nin atendas sur la strato, kaj post kelkaj minutoj ni staras antaŭ la tombo de Zamenhof. Silento. Delegitoj el ĉiuj landoj elparolas kelkajn vortojn. Brueto de fotoaparatoj. Eksonas La Espero. Ni disĝigas; kaj nur tiam mi plene konscias, ke tiu momento, kiam mi staris antaŭ la tombo de la Majstro estas privilegia momento en mia esperantista vivo, momento pri kiu mi estis pensinta, kiam mi eksciis, ke mi vizitos Varsovion, momento, kiun multaj samideanoj certe envias ...

La esperantista kunveno: la sola oficiala renkonto, dum kiu la interpretistoj estis maldungitaj! Ni ja certe ĉiuj dankas (kaj gratulas!) la dumil interpretistojn, kiuj daŭre kaj serveme helpis nin dum nia restado. Sed, sen interpretisto, kiel pli glate iras la aferoj!

La nombro de esperantistoj ĉe la Festivalo estis tre modesta; ĉu tio signifas, ke la nombro de esperantistaj junuloj estas tiom malgrava? Parte jes, sed ne ĉefe. Ĉu tio signifas, ke esperantistoj estas malaktivaj en la ĝeneralaj junularaj movadoj kaj havas negativan, sektan sintenon rilate al la ekstera (ne-esperantista) mondo? Grandparte jes. En la nuna tempo, kiam la decidiga paŝo de UNESKO

daŭrigo sur p. 18

LA DIAMANTA HAKILO.

(Litova fabelo).

La germanan tradukon esperantigis Josef Steppan.

Malriĉulo foje hakis lignon apud la bordo de rivero. Subite malfirmiĝis la hakilo de la tenilo, falis en la akvon kaj kuŝis tie sur la fundo. La malriĉulo ploris pro la perdo.

„Ve, kion mi faru nun? Kiamaniere mi nun haku la lignon? Kiamaniere mi nutru mian familion?”

Jen en la arbustaroj bruetoj kaj bruegis. Tap-tap-tap ... venis el la arbustaro stranga maljunulo. La barbon anstataŭis griza musko, la lipharojn anstataŭis pinobranĉetoj kaj anstataŭ nazo li havis pinan konuson.

„Pri kio vi lamentas bona homo? Kian malbonan aferon vi ekspertis?” li demandis.

„Kial mi ne ploru, kiam mia hakilo falis en la akvon? Per kio mi nun haku la lignon? Kiamaniere mi nun nutru miajn malgrandajn infanojn?”

„Mi helpos vin”, diris la maljunulo.

Li demetis la mantelon, elŝuigis la piedojn kaj — plumps, li saltis en la akvon. Post mallonge li revenis el la akvo kaj transdonis al la malriĉulo oran hakilon.

„Jen prenu, ĉu ĝi estas via hakilo?”

„Ne, tiu ĉi ne estas la mia”, respondis la malriĉulo.

Denove subakviĝis la maljunulo, baldaŭ li revenis kaj transdonis al la malriĉulo arĝentan hakilon.

„Jen, tiu ĉi estas certe la via!”

La malriĉulo skuis sian kapon.

„Ne, tio ne estas mia hakilo.”

Post la tria subakviĝo la maljunulo alportis feran hakilon.

„Tiu ĉi estas la mia”, ekkriis la malriĉulo.

Li prenis sian hakilon kaj volis daŭrigi sian laboron. Sed la maljunulo haltigis lin kaj diris:

„Restu kaj kunportu ankaŭ ĉi tiujn du hakilojn!”

„Nu, se vi volas tion, volonte” diris la malriĉulo. Mi kore dankas vin. Mi neniam forgesos vian bonecon.”

Kaj li hejmeniris.

Sur la ŝultroj li portis tri hakilojn: oran, arĝentan kaj feran.

Pri la bonŝanco de la malriĉulo aŭdis ankaŭ iu riĉulo, kiu estis tre posedema. Li pensis: Ankaŭ mi iru al la rivero, eble mi fariĝos eĉ pli riĉa.

Li kunprenis hakilon. La hakilon li nur malbone fiksis sur la tenilon. Nun li ekhakis lignon kaj zorgis pri tio, ke la hakilo falu en la akvon.

Laŭte li eklamentis:

„Ve, mi malfeliĉulo!”

En la arbustaro bruetoj kaj bruegis kaj la maljunulo alvenis.

La barbo estis el griza musko, la lipharoj el pinobranĉetoj. La nazo estis pino-konuso.

„Kiu lamentas ĉi tie? Kiu malfeliĉiĝis en mia arbaro?”

„Mi”, respondis la riĉulo: „Kiam mi hakis lignon, malfirmiĝis la hakilo kaj falis en la riveron. Kiu redonos ĝin al mi?”

La maljunulo demetis la mantelon kaj la ŝuacojn. Nun li saltis en la akvon. Li revenis kaj portis feran hakilon en la mano.

„Jen, ĉu tiu ĉi hakilo estas la via?” li demandis la riĉulon.

„Ne, tiu ĉi hakilo ne estas la mia, la mia estis pli bona.”

La maljunulo resaltis en la akvon kaj poste li transdonis al la riĉulo arĝentan hakilon.

„Eble ĉi tiu hakilo estas la via?” li demandis denove.

„Ne, ĝi ne estas la mia. Mia hakilo

estis pli bona!" diris la riĉulo.

Jen, la trian fojon resaltis la maljunulo en la riveron kaj elakviĝis kun ora hakilo.

„Ĉu tiu ĉi estas via hakilo?"

„Jes, ĉi tiu estas mia!" ekkriis la riĉulo. Jam de granda distanco mi rekonas ĝin. Rapide donu ĝin al mi."

Sed la maljunulo ne donis la oran hakilon al la riĉulo.

„Eble vi tamen eraras", li diris. „Sur la fundo de la rivero kuŝas an-

koraŭ hakilo, ĝi estas el pura diamanto. Eble ĝi estas la via."

„Ha" diris la riĉulo, „vi pravas, mi eraris. Tiu ĉi ora hakilo brilis tiel en la suno, ke mi imagis ĝin diamanta."

La maljunulo severe rigardis al la riĉulo, resaltis en la akvon, kunportis ĉiujn hakilojn kaj ĝis la hodiaŭa tago la riĉulo vane atendas sur la bordo de la rivero je lia alveno, la maljunulo neniam plu revenis.

SOLA SUR LA MARO.

(El Juna Espero, Sept./Okt. 1946).

La tago pasas. La suno brilas, sed nun ĝi estas apud la horizonto. Johano staras sola sur peco de ligno en la centro de vasta akvo-sceno.

Li serĉas per akraj okuloj. Li vidas akvon, akvojn, maron, marojn. Li vidas la bluan ĉielon: jes, kaj unu birdon kaj alian. Sed li ne serĉas ilin: li serĉas alian objekton.

Li serĉas sur la horizonto sub la falanta suno. En tiu direkto li ne vidas la alian objekton. Ĉe la sudo li ne vidas ĝin kaj ne ĉe la nordo. Nun li turnas la vizaĝon al la griza oriento: tie li rigardas tie il serĉas longe, atente.

Ho! Li vidas blankan objekton. Li streĉas la okulojn. Ĝi aperas pli granda. Ĝoje! Jen blanka ŝipo sur la ĥar-simila horizonto.

Apud la piedoj de Johano bastono kuŝas. Li prenas ĝin. Al ĝi li fiksas ĉemizon per ĝiaj du brakoj. Alte super la kapo li levas la strangan flagon. Nun intense li rigardas la ŝipon en la distanco.

Malrapide la vento movas la barkon trans la maro. Ĉu la viroj sur la ŝipo rimarkas lin? Ĉu ili turnas ĝin al li? Ĉu nun ĝi estas pli granda? Eble. Eble. Sed ne! Ĝi ankoraŭ estas paralela, ĝi ankoraŭ vojaĝas sur la mal-

dika griza linio. Evidente neniu rimarkas la knabon solan sur la vasta verda oceano.

Johano komencas kriegi. Li krias laŭte, tre laŭte, sed lia voĉo estas la voĉeto de insekto super vastaj akvoj, sub grandaj blujaj arkoj. Ĉu ne la viroj aŭdas? Li kriegas. La eta sono malaperas en la venton.

Johano rimarkas tiun venton. Li rimarkas ĝian direkton. Jen! ĝi blovas rekte de li al la blanka ŝipo sur la ĥarlinio. Li en-diras: „Johano, pli laŭte kriu: tre-tre laŭte!"

Nun li malfermas larĝe la buŝon. Li streĉas la kolon, la gorĝon. Li streĉas la korpon, eĉ la kruojn. Profunde li enspiras. Nun en la aeron li puŝas grandan laŭtan kriegon kaj en la sama momento levas eĉ pli alte la flagon super la kapo.

Ĉu la ŝipistoj aŭdas? Dum minutoj li rigardas, intense rigardas. Ĉu vere ili turnas la barkon? Ĉu vere ĝi nun fruntas al li?

Jen ĝi estas pli granda, — kaj eĉ pli granda. Ĝi venas al li. Fine, fine li estas savita de la lignopeco en tiu vasta mar-dezerto.

H. G. T.

ORGANIZAJ INFORMOJ.

De post pli ol unu jaro ni ne havas kasiston. Tamen la libreto de el-kaj enspezoj de la redaktejo devas esti kontrolata. Bonvolu la kontrolantoj sciigi, kiu unue el ili deziras havi la dokumentojn, por ke mi povu ilin kiel eble plej baldaŭ sendi.

Koran dankon al S-ino Lilli Giloteaux, kiu per sia monsendo ebligis la aperon de ĉi tiu numero. **Kiu lando**

kolektis ankoraŭ monon kaj povas tion disponigi por la preĝigo de LJV?

Geamikoj, la apero de LJV estas en viaj propraj manoj. Pripensu, ke neniu presejo laboras sen mono.

OKK en L'Aquila estas petata kiel eble plej baldaŭ doni la necesajn informojn koncerne la gajnintojn de la konkursoj, por ke ilia nomo povu aperi en la Juna Vivo. Dankon.

daŭrigo de paĝo 15

estos post nelonga tempo sekvata de alia grava okazantaĵo: la renaskiĝo de nia movado en la orienteŭropaj landoj, en tiu historia epoko de nia Movado, ni ne devas endormiĝi aŭ... daŭrigi nian dormadon. Se la celo de Esperanto estas: helpi al interkompreno de la homoj, la tasko de la esperantistoj estas: troviĝi ĉie, kie oni bezonas ilin.

Tial mi ne bedaŭras, ke mi ne estis kun vi en L'Aquila. Tial mi esperas, ke ni nin trovos multenombraj ĉe la

venonta Festivalo (oni flustras pri Moskvo) kaj ke ĝis tiam niaj klopodoj havos pliajn sukcesojn por la uzo de nia lingvo en la 6-a Festivalo.

Vi certe estas scivolemaj pri miaj impresoj rilate al la urbo kaj enloĝantoj. Tion mi preparolos venontan fojon.

Michel DUC GONINAZ

delegito de la lernantoj de la Supera Seminario en Saint-Cloud ĉe la 5-a Junulara Festivalo.

daŭrigo de paĝo 19

SABATE:

09.30—10.00 Rio de Janeiro, 30,7 m, 9772 kc/s: K kaj I.
18.45—19.00 Barcelono (Hispanujo), 360 m, 832 kc/s: P.
23.15—23.25 Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956 per Hilversumo II, 298 m, 1004 kc/s), KRO: Monata resumo (nur la lastan sabaton de ĉiu monato; la aliajn sabatojn: Katolikaj I de 23.15—23.22).

Informoj kaj petoj:

Radio Roma. — Atentu pri la novaj ondlongoj, frekvencoj kaj elsendo-tempo. Jen detaloj pri la programo en decembro 1955: 2: La radio kaj la blinduloj okaze de la sesdeka datreveno de la malkovro de la radio. 7: Mondo esperantista: „Jubileo de la Roma Esperantista Grupo”. 9: Leterkesto kaj bibliografio. 14: Novajoj el Italujo. 16: Italaj turismaj urboj: „Massa kaj Carrara”. 21: Honorigo al Zamenhof. 23: Kristnasko. 28: Romo dum vintro. 30: Pinjaro kaj Novjaro.

Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo NCKE, Wal-taweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando) Nederlando.



Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo. Mallongigoj: m = metroj; kc/s = kilocikloj en sekundo; I = informoj; P = parolad(et)o; K = kurso; M = muziko.

VERDLANDO VOKAS.

LUNDE:

- 00.00—00.30 Bilbao (Hispanujo), 265 m, 1131 kc/s: I kaj P.
 13.30—14.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m, 1200 kc/s: P kaj K.
 23.45—23.57 Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956: Hilversum II, 298 m, 1004 kc/s), NCRV: P kaj M (nur la unuan lundon de ĉiu monato).

MARDE:

- 02.15—02.30 San José (Urugvajo), 192 m, 1562 kc/s: P.
 12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 21520 kc/s, 31,46 m, 9535 kc/s, 48,66 m, 6165 kc/s: P de d-ro Arthur Baur.
 15.50—16.00 Ljubljano (Jugoslavujo), 327 m, 916 kc/s, 211 m, 1420 kc/s: K.
 18.35—18.40 Berno, samaj ondlongoj, frekvencoj kaj P kiel 12.55.
 19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m, 1040 kc/s: I.
 20.00—20.15 Radio Afrika en Tanger, 25,63 m, 11705 kc/s, 42 m, 7140 kc/s: P de la sveda sekcio de K.E.L.I. (Libera sveda kristana radio). (Nur la lastan mardon de ĉiu monato. Unua elsendo la 27/XII/1955).

MERKREDE:

- 16.30—16.40 Vieno II, 25 m, 12000 kc/s, 30 m, 10000 kc/s, 41 m, 7312 kc/s, 48 m, 6250 kc/s, 203 m, 1474 kc/s: P.
 18.55—19.10 Romo, 30,90 m, 9710 kc/s, 41,15 m, 7290 kc/s, 50,34 m, 5960 kc/s: P de Luigi Minnaja.
 23.05—23.15 Vieno I, 25 m, 12000 kc/s, 49 m, 6122 kc/s, 513 m, 586 kc/s: I.
 23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m, 1004 kc/s (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956 per Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s), VARA: I.

JAŬDE:

- 07.45—07.50 Perpignan-Rousillon, 202 m, 1483 kc/s: K.
 09.30—09.40 Parizo, 348 m, 860 kc/s, 218 m, 1380 kc/s: K de Pierre Delaire.
 12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 21520 kc/s, 31,46 m, 9535 kc/s, 48,66 m, 6165 kc/s: P de prof. d-ro Edmond Privat.
 18.35—18.40 Berno, samaj ondlongoj, frekvencoj kaj P kiel 12.55.
 23.30—24.00 Valencia, 200 m, 1500 kc/s: P kaj I.
 23.45—24.00 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m, 1133 kc/s: P, I kaj M.

VENDREDE:


- 02.15—02.30 San José (Urugvajo), 192 m, 1562 kc/s: P.
 18.55—19.10 Romo, 30,90 m, 97,10 kc/s, 41,50 m, 7290 kc/s, 50,34 m, 5960 kc/s: P de prof. d-ro Vincenzo Musella.
 19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m, 1040 kc/s: I.
 22.30—22.45 Guatemalo, 30,50 m, 9836 kc/s, 47 m, 6382 kc/s: I.

daŭrigo sur paĝo 18

ŜIRMU LA BIRDOJN.

Frosta vento blovas, malvarma la vintro,
Rubekol' rigardas al fenestra vitro.
Mangaĵon serĉante ĝi en neĝo skrapas,
Nenion trovinte ĝi la vitron frapas.

„Estas malvarmege ekster la fenestro,
Malfermu, malfermu, mia kara estro.
Viajn frukto-arbojn mi ŝirmis dum somer',
Nun mi petegas vin pri iom da semer'.



Ŝirmu min dum vintro de l' malvarma vento,
Printempe ni ĉion repagos kun rento.
El via fruktĝarden' vermoj malutilaj
Malaperos tiam en stomakoj filaj.”

La bonegaj homoj aŭdas ĝian peton,
Konstruas sur korton por-birdan-dometon.
Akvo kaj mangaĵo dum la tuta vintro
Atendas tie je ĉiu eta birdo.

Se oni dum vintro la birdaron nutras,
Tiam en somer' la fruktrikolt' ne putras.
La etaj birdoj ne forgesas la homojn
Kaj de l' vermoj ŝirmas liajn pirojn, pomojn.

Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas entute nur 2.50 fl. aŭ egalvaloron.

L. Heilberg, Poste Restante, KITWE, Northern Rhodesia.